



INFORMILO 9

SEPTEMBRO 2022 Kol. 448/38

XX

Enhavo: 107-a UK; Maskerado en ĈRo 3; Mesaĝo de UEA; Eŭropa kongreso 2024; La vivo povas aspekti tiel; Rememoro; Trista anonco

XX

La 107-a UK de Esperanto (6-13 aŭgusto 2022)

Sabate la 6-an de aŭgusto 2022 komenciĝis la 107-a Universala Kongreso en Montrealo kun 837 aliĝintoj el 56 landoj. Inter ili estis ankaŭ nia amiko Petr Chrdle, kiu promesis al ni skribi ion pri tiu ĉi UK. Ni antaŭĝojas legi pri liaj travivaĵoj.

La Internacia Jardeko de Indiĝenaj Lingvoj (2022-2032) estas la temo de la 107-a UK, kie oni diskutis pri la rilatoj inter lingvo, vivmaniero, ekologia scio, indiĝenaj rajtoj kaj la Celoj por Daŭripova Evoluigo. Inter la agadoj pri la temo, la Kongreso eldonis novan tradukon de la Deklaracio de Unuiĝintaj Nacioj pri la Rajtoj de Indiĝenaj Popoloj, en Esperanto, kaj diskutis kiel aktivi por indiĝenaj rajtoj, helpe de tiu grava dokumento.

red.

Maskerado en la radiostacio ĈRo 3

Ĉiam tre grava okazo estas, se pri Esperanto interesiĝas neesperantistoj de si mem. Ja estas klare, ke tiu, kiu montras meminitate intereson, tiu ankaŭ multe pli atente perceptas la informojn ol informojn nepetatajn. Tio validas ne nur se temas rekte pri Esperanto, sed ankaŭ se temas pri io, kie Esperanto

ludas iun rolon kaj do la informo pri ĝi povas kaŭzi pliajn demandojn.

Tion mi jam spertis plurfoje, precipe kiam mi eldonis librojn tradukitajn el Esperanto. Al tiuj apartenas ankaŭ du libroj de Tivadar Soros en traduko de Jindřiška Drahotová, nome *Maškaráda kolem smrti* eldonita en la jaro 2014 kaj *Robinsoni na Sibíři* en la jaro 2016. Parenteze, por *Maskerado ĉirkaŭ la morto* mi ricevis tre pozitivan eĥon de la juda komunumo en Prago, nome ke ĝi, kaj precipe la klarigoj de Humphrey Tonkin fine de la libro, estas la unua fonto en la ĉeĥa, kiu tiel detale priskribas la tempon de la holokaŭsto en Hungario, do ĝi estas ege valora!

Antaŭ ol veni al la poparta legado de la libro en radio, decas mencii la historion de tiu ĉeĥa versio de „Maskerado“. Kiam mi ricevis la tradukon de Jindřiška, mi tuj ekkonis ĝian historian valoron kaj cerbumis, kiel ĝin eldoni, ĉar mankis al mi sufiĉe da mono. Ja la verko meritas ankaŭ belan aspekton kaj bedaŭrinde ne estas eĉ malgranda espero, ke la enigita mono povus almenaŭ duone reveni per vendoj.

Mi do turnis min al mia amiko Humphrey, la jam menciita aŭtoro de la klarigaj notoj, kiu havas bonan rilaton al la filo de la verkinto kaj kopirajtposedanto, la mondkonata financisto kaj filantropo George Soros, ĉu li afable petus de li ne nur senpagan kopirajton por la verko de sia patro, sed eĉ ioman subtenon de la ĉeĥa eldono. Tio realiĝis kaj mi ricevis ne nur la senpagan kopirajton, sed eĉ mendon por 150 ekzempleroj antaŭpagitaj, de



kiuj mi devis sendi 20 ekzemplerojn al Soros kaj la ceterajn disdoni al bibliotekoj elektitaj de mi, nome de G. Soros. Tial nun en multaj bibliotekoj, kvankam ili verŝajne ne aĉetus ĝin, oni posedas „Maskeradon“ en sia libra fonduso kaj tiuj do povas servi al la legantoj. Sub similaj kondiĉoj aperis ankaŭ „Robinsonoj“.

Nu, pasis jaroj kaj decembre 2021 mi ricevis retmesaĝon de la „fako de dramo kaj literaturo“ de la Ĉeĥa Radio kun la peto pri la kopirajto por *Maškaráda kolem smrti*. Mi respondis, ke mi neniam postulas de aŭtoroj aŭ tradukantoj ekskluzivan kopirajton, kiu do tiuokaze restis ĉe la filo de la forpasinta aŭtoro kaj ĉe la tradukintino. Sed mi promesis helpi al ili ricevi la kopirajtojn.

Do, post plia konsulto ĉe Humphrey mi denove turniĝis al s-ro Vachon, kiu subskribis la antaŭajn licencajn kontraktojn komisiite de G. Soros, kaj kun lia permeso mi transdonis lian retadreson al la radio, same kiel retkontakton al Jindřiška, kun kiuj oni jam fintraktis la permesojn memstare.

La rezulto estas tre pozitiva. La dekparta legado de la ĉeĥa versio de „Maskerado“ okazos ekde la 21a de septembro, ĉiam kun komenco je la 23:33. Tamen, ne necesos ĉiam noktumi, se iu kutimas enlitiĝi pli frue, ĉar ĝi estos atingebla ĉiam unu monaton post la disaŭdigo libere en la retpaĝaro de la radio.

Do, gratulon al Jindřiška, kiu certe estos nomita kiel tradukistino. Kaj, kvankam mi ne povas influi tion, preskaŭ certe estos menciita ankaŭ la origina lingvo de la libro, el kiu la ĉeĥa versio estis tradukita, kio espereble denove iom levos la

demandojn pri Esperanto, eble kun kutima miro *Ĉu ĝi ankoraŭ vivas?*
Petr Chrdle

Mesaĝo de UEA okaze de la Internacia tago de amikeco, la 30-a de julio 2022

La 30-a de julio estas Amikeca Tago. Antaŭ dek unu jaroj, en 2011, la Ĝenerala Asembleo de UN deklaris tiun tagon la Internacia Tago de Amikeco, surbaze de la alvoko de Unesko. La Internacia Tago de Amikeco memorigas nin, kiel grave estas, ke ni forte laboru por kultivi amikecon tutmonde – por engaĝi nin en la problemojn, kiujn la mondo frontas kaj kapti okazojn, kiuj povas plibonigi la staton de la terglobo kaj ĉiuj ĝiaj enloĝantoj. Ĝi memorigas al ni, ke kunlaboro efikas pli bone ol konflikto, ke rekoni la bonon en aliaj estas pli bone ol batalado pri la malbono, kaj ke veraj internaciaj harmonio kaj kunlaboro postulas fidon. Estas feliĉa koincido, ke la Internacia Tago de Amikeco kaj Esperanto-Tago okazas ene de kelkaj tagoj unu de la alia.

La 26-a de julio estas la Esperanto-Tago. L. L. Zamenhof lanĉis la internacian lingvon Esperanto tiun tagon en la jaro 1887. Zamenhof asertis, ke la esenco de la fido estas kompreno – kaj ke komprenon oni plej bone atingu per komuna lingvo. Li proponis Esperanton kiel facile akireblan neŭtralan lingvon inter parolantoj de malsamaj lingvoj. Hodiaŭ, troviĝas kompetentaj parolantoj de Esperanto tra la tuta mondo, kalkuleblaj per milionoj kaj troviĝantaj en la plimulto de la Membraj Ŝtatoj de Unuiĝintaj Nacioj. Laŭ la ekzemplo de sia fondinto Zamenhof, ili laboras por kunigi la homojn en spirito de paco kaj fido kaj por forigi la kaŭzajn radikojn de konfliktoj.

Inter tiuj kaŭzaj radikoj estas manko de interkompreniĝo inter la popoloj de la mondo, kaj inter la kaŭzaj radikoj de la manko de kompreno estas la problemo de lingvoj. Se diri tute dece, ni la popoloj, tute nete, ne komprenas unu la alian.

Paroli la saman lingvon ne nepre alportas pacon, sed se oni ligas ĝin al amikeco, ĝi prezentas la plej bonan ŝancon por paco. Jen kial Esperanto-parolantoj uzas sian lingvon por antaŭenigi amikecon tutmonde. Ni alvokas aliajn, ke ili solidariĝu kun ni, kaj ni salutas Unuiĝintajn Naciojn okaze de tiu ĉi speciala tago.

Eŭropa Kongreso 2024 okazos en Strasburgo

Ĝi okazos de la 8-a ĝis la 13-a de majo 2024 (Francio – Strasbourg). Delonge ne okazis Eŭropa Kongreso de Esperanto: Strasburgo invitas ĝin!

Eventa Servo (SMG: sed malfacilas malkovri kiel atingi 2024! Iru suben, ĉe la sekvaj paĝoj, klaku plurfoje sur ‘Sekva’ ĝis vi fine atingis la celatan jaron.)

Germana Esperanto-Asocio (**GEA**) kaj Unuiĝo Franca por Esperanto (**UFE**) decidis kune kongresi en 2024 en Strasburgo. Antaŭaj komunaj kongresoj okazis en Germanio en Kaiserslautern en 2010 kaj Zweibrücken en 2018.

Sed ĉar Strasburgo estas ankaŭ unu el la ĉefurboj de Eŭropaj instancoj, ni decidis pligrandigi la kongreson invitante aliajn landajn asociojn de Eŭropo, por ke okazu vera **Eŭropa Kongreso!** Eŭropa Esperanto-Unio (EEU) jam anoncis sian aprobon kaj subtenon.

La datoj estas interkonsentitaj: de **merkredo la 8-a ĝis dimanĉo la 12-a de majo 2024**, kaj tuttaga ekskurso okazos en **Colmar**

la 13-an de majo. Tiuj datoj inkluzivante la 9-an de majo, kiu estas la Tago de Eŭropo kaj ferio en diversaj landoj, estas elektitaj pro tio, kaj pro la fakto ke en 2024 estos ankaŭ tago de la ĉielira festo.

La vivo povas aspekti tiel

Nia E-amiko festis ĉijare en julio sian 80-jariĝon. Li ĉiam rememoras sian edzinon kaj ripetas, ke li estis feliĉa kun ŝi, ke ŝi estis helpo de lia vivo. Li partoprenadis ĉiam sola E-renkontiĝojn, kie li fotis kaj filmis. Li mem priskribis sian vivon tiel:

El mia vivo.

En la jaro 1970 mi komencis rigardi al Věra - mia estonta edzino. Post du jaroj ni vere konatiĝis kaj dum unu el niaj promenoj al monteto ŝi faris kelkajn paŝojn kun iom kurbaj piedoj, simile kiel infanoj, kiam ili friponas. Ŝi estis 23 j. kaj mi 30 j. Tio ne plaĉis al mi, mi admonetis ŝin, ke tio ne estas amuza. Mi mencias tiun eventon, kiun mi tiam ne imagis, ke ĝi estos direktilo de nia vivo. Ni ĝojis kune, sed en la jaro 1975 kuracistoj diris al Věra, ke ŝi estas malsana pro multobla sklerozo. Unu jaron poste ŝi gravediĝis, sed kuracisto diris, se ŝi restos graveda, ke ŝi devas kalkuli, ke pro la malsano estas plejverŝajne, ke ŝi estos en rulseĝo. Kia alia decido, se tia juĝo estis eldirita. Sekvis interrompo. Kion poste?

En la jaro 1979 ni geedziĝis. Kaj ĉu la vivo iris bone? Ne. Post la geedziĝo, ni decidiĝis por adopto de infano. Ĉar oni al ni proponis ne bebon, sed pli maljunan infanon, ni retiriĝis laŭ decido de mia edzino.

Post du jaroj kuracistoj al ŝi diagnozis cervikan kanceron. Pro tio ni veturadis al Hradec Králové por surradiad-kuracado. Tio okazis multfoje. Mirinde, ŝi eltenis tion sufiĉe bone. La kancero

eble estis ekstermita, sed estis kromefikoj post la surradiado. Inkontinenco kaj tio ne plu povas esti resanigita. Kio restis - ni lernis vivi kun tio. Proksimume post la jaro 1982 Věra devis uzi rulseĝon. Tiam mi rememoris nian promenon, dum kiu jam estis antaŭsignoj – kiel mi ŝin admonis ...

Dum sia tuta vivo Věra havis la grandan problemon: ŝi hontis pro sia malsano. Ŝi ne volis, ke iu ajn rigardu ŝin – eĉ ne parencoj. En la lastaj jaroj la aferoj koncerne la malsanon eĉ malboniĝis: ŝi havis ŝtonojn en siaj renoj, kaj aliajn ŝtonojn en la galveziko, kio postulis striktan dieton. Se ne, oni povus atendi diareon. La kuracistoj ne rekomendis operacion. La evoluo de multobla sklerozo estas tia, ke ŝi entute ne moviĝis perpiede dum la lastaj kvin jaroj. Kaj ĝia efiko en la manoj – ofta „formikado“ kun alternaj sentoj de varmo kaj malvarmo. Demandite, la kuracisto respondis, ke ŝi povas fari nenion pri tio. Do nur senĉese kuŝi kaj kuŝi. Kaj venis alia malsano – diabeto. La priservado de ŝi jam estis por mi tro laciga, do estis decidite, ke ekde la 31-a de julio 2020, ŝi estis en la hospitalo por longdaŭraj malsanuloj.

Laŭ la retletero de K. Ĉada tradukis L.S. kaj M.T.

Rememoro

Eble vi rememoras la memorlokon en Pardubice, la benkon dediĉitan al urbo-viktimoj de la Covid-19, pri kiu ni informis vin en la antaŭaj numeroj de Informilo.

La partoprenantoj de la duon-jarcenta naskiĝtaga festo de du esperantistinoj – Andrea kaj Lucie – profitis la trankvilan sabatan posttagmezon por promeni kaj memori la tristan okazon per kandel-lumigo sur la benko. Ĝi situas en la historia

centro de Pardubice, proksime de la teatro, kiu estis konstruita komence de la pasinta jarcento.



Ili tiel esprimis dankon al Lenka Angelová, longjara membro de la E-klubo en Pardubice, prezidantino de AEH kaj ankaŭ anino de la "internacia" libera asocio E-mental'. Ŝi forlasis nin en marto de la pasinta jaro. Plej verŝajne ĉi tiu ago fariĝos tradicio, ĉar ĝuste en aŭgusto estas tempo, kiam havis naskiĝtagon ankaŭ Lenka.

Andrea Ŝindelářová

Trista anonco:

La 3-an de junio 2022 forpasis post longa, grava malsano Josef Krob, (66 j.) el Kladno, multjara ano de AEH.

Honoron al lia memoro.



INFORMILO – monata gazeto por esperantistoj-handikapuloj + suplemento **ANTAŬEN**

Eldonas AEH – Asocio de esperantistoj-handikapuloj en Pardubice

Redaktoroj: Mirka Kosnarová, Ludmila Srbová

Adreso: Svaz zdravotně postižených esperantistů, Na Okrouhlíku 953/21,
530 03 PARDUBICE, CZ tel. +420 721 537 970

e-mail: ach@esperanto-ah.eu interreto: www.esperanto-ah.eu

Banka kunligo: Fiobanko, kont-numero de AEH 2801322017, bank-kodo 2010

Bankovní spojení: Fio banka, číslo účtu AEH 2801322017, kód banky **2010**

IBAN: CZ352010000002801322017 **SWIFT/BIC:** FIOBCZPPXXX

La jarabono de Informilo **20 €** (en kovertoj), aŭ **10 €** (e-mail)

Roční předplatné Informila **300,-Kč** (v obálkách), nebo 150,-Kč (v e-mailu)

Při platbách vždy uveďte vaše členské číslo (naleznete nad vaší adresou) jako variabilní symbol! Příspěvek svazu AEH v dobrovolné výši.

Kotizo por AEH propravola. Kodo ĉe UEA: aehk-z

La redakcio ne ĉiam havas la saman opinion kiel la aŭtoroj de la artikoloj.